TELOPEO
Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 59, Numero 1, aprilo 2024*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else**

## Anoncoj

*Jonathan Cooper, prezidanto de EFNSK*

### Ĉu vi volas helpi pri la Aŭstralia Esperanto-arkivo?

Dum tri tagoj, merkredo la 24-a ĝis vendredo la 26-a de aprilo, pluraj esperantistoj de diversaj urboj ĉirkaŭ la lando kuniĝos ĉe Esperanto-Domo por partopreni la duan arkivan laborsesion. (La unua okazis en aprilo 2019, sed planoj por la dua en 2020 estis prokrastataj pro la pandemio.)

Ni daŭrigos ordigadon de materialo kaj serĉadon de aparte gravaj kaj interesaj aferoj por skani, kaj planos sistemon de katalogado.


Dum la vespero de la unua tago (merkredo, la 24-a de aprilo), ni iros al la Art-Galerio de Nov-Sud-Kimrio (kiu restos malfermita ĝis la 10-a ptm), por ĝui la arton, gvidite de Jonathan.
Se vi volas helpi, bonvolu kontakti Jonathan (per nsw@esperanto.org.au).

### Esperanto Course for Beginners

Saluton! We are pleased to announce that we will be running a 10-week beginner's Esperanto course on Sunday evenings (5pm), starting 21 April. It's free for members* and it will give you all you need to start chatting in Esperanto after just 10 hours. It will be held at Esperanto House, and also by Zoom. 21 April – 23 June, 5pm – 6pm
Please register below so that we have an idea of numbers (and to get the Zoom link if necessary).
forms.gle/JUfqub8sBiEMxNZRA
[* If you're not a member yet, it only costs $15: esperantohouse.org.au/about-us/join]

## Puzlo kaj Esperanto

*Nicole Else, sekretario de EFNSK*




En novembro mi renkontis Donnalouise en la Esperanto-domo de Sidnejo. Donnalouise loĝas en Novzelando kaj havas jutubkanalon nur pri puzloj. Mi donacis al ŝi puzlon de la Esperanto federacio de Novsudkimrujo kaj jen la rezulto. Mi esperas, ke dank' al ŝi multaj personoj scios pli pri Esperanto.




[https://www.youtube.com/watch?v=V0m4pyn9Jew](https://www.youtube.com/watch?v=V0m4pyn9Jew)

## La biblioteko finfine preta!

*Jonathan Cooper, prezidanto de EFNSK*

Mi feliĉas informi vin ke la biblioteko ĉe Esperanto-Domo estas finfine preta por ebligi membrojn prunti el ĝi. Post 18 monatoj da ĉiusemajna laboro, ĉiuj 2700+ libroj (kaj plejmulte de la periodaĵoj) estas katalogitaj, etiketitaj, stampitaj kaj ordigitaj sur la bretoj. La plano estas poste starigi retan pruntosistemon, sed ĝis tiam, estas permana sistemo, uzante libron. Tamen, oni povas nun vidi la katalogon kiel tabulo, ĉe bit.ly/biblioteko-katalogo.

Do, kion vi trovos en la biblioteko? Nu, kio interesas vin? Ĉu biologio? Eble vi ŝatus la libron *Sekretoj de la marestaĵoj*, de Petar Giunio. Ĉu kosmologio? Davis Galadi-Enriquez kaj Amri Wandel verkis *La kosmo kaj ni: Galaksio, planedoj kaj vivo en la universo*. Estas ankaŭ multaj libroj pri geografio, historio kaj aliaj fakaj temaj. Kompreneble, estas multaj libroj (fakte, pli ol 500) pri Esperanto mem, inkluzive de vortaroj, lernolibroj, kaj libroj pri gramatiko, la historio de Esperanto aŭ la E-movado, kaj studoj pri, kaj konsiloj por, verkado. Estas eĉ multaj libroj en la angla, kiuj argumentas por Esperanto. Tamen, la plej granda ĉefsekcio de la biblioteko estas literaturo, kaj originala kaj tradukita, inkluzive de romanoj, noveloj, teatrotekstoj, poezio, kantoj, paroladoj kaj bildrakontoj.



Estas pluraj famaj, gravaj kaj legindaj E-verkistoj, kies verkoj estas en la kolekto, inkluzive de:
William Auld
Julio Baghy
Marjorie Boulton
Jean Forge
Kalaman Kalocsay
István Nemere
Ivo Lapenna
Claude Piron / Johán Valano
Edmond Privat
Raymond Schwartz
Trevor Steele
Ferenc Szilágyi
Gaston Waringhien
kaj kompreneble... LL Zamenhof

Malpli famaj, sed ankoraŭ legindaj, estas verkistoj persone konataj de aŭstraliaj esperantistoj (krom Trevor Steele). Ekzemple, nia sekretario Nicole Else verkis anglan libron por infanoj, *Mummy, why can't we all speak the same language?*, kaj ŝia patrino, Lilli Giloteaux, verkis libron de poemoj, *Kalejdoskope*, kaj terminaron pri arboj, ambaŭ kiujn ŝi ilustris. Bob Felby, de Adelajdo, verkis membiografion, *Malgrava historieto pri mia vivo*. Estas ankaŭ libroj de aŭstralianoj Ralph Harry, Donald Broadribb, Marcel Leereveld, Kenneth Linton, Penelope Vos kaj Kit Kelen, krom aliaj. Fakte, se vi interesiĝas pri Esperanto en nia lando, vi devus prunti *Galerio de esperantistoj en Aŭstralio*, de Charles Stevenson kaj Katarina Steele, aŭ *Esperanto en Aŭstralio (1905-1985) (Historio de AEA)* de Ray Ross.

Se vi volas plibonigi vian scipovon de Esperanto, mi rekomendas ke vi trovu libron, kiun vi jam pli-malpli konas en via gepatra lingvo. Ekzemple, mi kreskis en kristana eklezio, do mi konas multon de la Biblio, aparte la Nova Testamento. Do, kiam mi eklernis Esperanton, mi legis la Biblion en Esperanto, kaj ofte lernis novajn vortojn per kunteksto. Mi ĝuis legi longajn eltiraĵojn sen la neceso konsulti vortaron.

Fine, unu aparte rekomendinda libro verŝajne havas la plej interesan kaj amuzan titolon: *In the land of invented languages: Esperanto rock stars, Klingon poets, Loglan lovers, and the mad dreamers who tried to build a perfect language*, de Arika Okrent (2009). Oni trovos ĝin en la interlingvistika sekcio:
E-81INT-a Okr

EFNSW: Esperanto Domo
Kontaktu Jonathan Cooper: 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm;  Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo: 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:
Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 10:00 – 20:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*

| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Dmitry Luŝnikov |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Alan Turvey |
| Estraranoj: | Adam Levy, Terry Manley |

